# *Portoriko: la rajto je memdetermino kaj sendependeco.*



UN, 18 jun (RHK) La postulo de Portoriko por sendependeco alvenas al UN kiu analizos en la komitato por senkoloniigo la situacion de tiu teritorio submetita ankora? al regado kolonia de Usono.

Tiel estas esprimite en la projekto de rezolucio prezentita de Kubo en tiu instanco, kiu konfirmas la rajton nekontesteblan de la portorika popolo al libera memdetermino kaj sendependeco, raportas la informagentejo Prensa Latina.

?i anka? konfirmas la latinamerikan kaj kariban karakteron de tiu teritorio kun ties propra kaj ne konfuzebla indenteco nacia, kaj alvokas la usonan registaron impulsi procezon kiu ebligu al la portorikanoj efektivigi sian rajton je memdetermino, sendependeco kaj decidopovo.

La projekto de rezolucio esprimas zorgojn pro la decido de la usona kongreso altrudi estraron de financa kontrolo al Portoriko  por efektivigi plenan povon super la ekzekutivaj kaj le?ofaraj funkciuloj en temoj fiskaj, ekonomiaj kaj bu?etaj.

Same, oni observas kun anta?zorgoj la detruajn efikojn de la uraganoj Irma kaj Maria en tiu kariba insulo, kiu unu jaron poste ankora? restas en profunda humanitara krizo.

La postulo de sendependeco por la portorika nacio havas vastan subtenon de personecoj, registaroj kaj politikaj fortoj de Latinameriko kaj Karibio.

Pluraj deklaroj de la gvidantoj de la komunumo de latinamerikaj kaj karibaj ?tatoj (Celac), la movado de nealiancitaj landoj (Mnoal) kaj la Bolivara  alianco por la popoloj de Nia Ameriko (Alba-TECP) anka? konfirmas la rajton de la portorika popolo.

Tiu ?i estas la rezolucio 37, la plimulto prezentita de Kubo, kiu estas analizita en la komitato de UN por senkoloniigo pri la temo de Portoriko.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/164851-portoriko-la-rajto-je-memdetermino-kaj-sendependeco

**Radio Habana Cuba**